



Oficiala Organo
de _____

Flandra _____

Ligo _____

Esperantista _____



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belga

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

Sekve al la malvaloriĝo de la belga valuto, la prezo de ĉiuj libroj eldonitaj eksterlande, trecege plialtiĝis.

Pro tiu kaŭzo ni provizore ne renovigos la stokon de F. E. I. kaj reaĉetos nur laŭproporcie de la ricevitaj mendoj.

La varoj de kiuj restas provizo, estas vendataj je la originala prezo, ĝis elĉerpiĝo.

La novaj prezoj estos kalkulataj kiel eble plej favore; sekve ni estas devigataj provizore ne plu konsenti rabaton al la grupoj, sed anstataŭe la sendkostoj ne devas esti pagataj, escepte por mendoj de malpli ol 10 frankoj.

EL LA PREZARO:

Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	Fr.	7,50 broŝ.
Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor		10,— »
La Du Amatinoj — de Musset		7,50 »
La Junulino el Stotmyr — Selma Lagerlöf		12,— »
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf		12,— »
La Infanoj de Betlehem — Selma Lagerlöf		5,— »
Dialogoj kaj Komedietoj — E. Dahl		3,75 »
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto		4,— »
La Stranga Butiko — R. Schwartz		17,— »
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz		17,— »
Gaja Lernolibro (ilustrita)		12,— »
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck		5,— »
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)		2,— »
Schidlof Zakwoordenboek		22,50 »
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a kaj 5-a jarkolektoj (kompl.)		15,— »
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n° 1)		10,— »
Flageto por biciklo		6,— »
Fotografajo D-ro Zamenhof, bela poŝtkarto		2,— »

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2,00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Vedra stelo, kun kruco: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.

Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Glumarkoj « Vredesaktie » po 3 fr. por 100.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

Flandra Esperantisto

Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate



Redakcia-
adreso:
Houwerstraat, 22
Antwerpen.
Tel. : 277.51.



Administranto :
Gerard Debrouwere
Magdalenastr. 29
Kortrijk
Tel. : 1654

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belga
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.
Poŝtĉeko : 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,
A. LODEMA kaj aliaj.

11 Julio 1302

de R. VERHULST

Alrajdas al Flandruj' sur suna fon'
Fieraj kavaliroj kun glav' flama,
Dentita l'kalkanum' per ora spron'
Kaj ĉirkaŭ korp', ĉeval' arĝento skvama.

Kun en la kruda, vila brust sopir'
Volupta al karn' mola, trup' terura
Jam antaŭiras, ruĝa pro dezir'
Al murd', pendig', batal', al sang' purpura.

» Sur fristojn metu fajrajn kokokrestojn;
» Starigu pendigilojn laŭ la strat';
» Senintestigu l' virojn kiel bestojn,
» Ke mortu in' kaj id' per sama bat'! »

Johanna kun rab-birda beko blekis (*)
Vang' flava ŝia ruĝis pro malam',
« Kaj kaptu oron! » ŝia edz' liplekis
Kun streĉa kol' kaj kun avida flam'.

La Flandroj sudeniris en silent',
Vestitaj brune kaj trankvile certaj.
Jen for la pezaj paŝoj de taĉment',
Vilaĝ' kaj urbo estas nun dezertaj.

(*) Johanna de Navarujo.

Sur hela griz' de l' vojo fuĝantar'
Punktigās nigre. En kvieta gravo
Flandrujo etendiĝas. Infanar',
Virin' nur restas kaj kaduka avo.

* * *

Subite dum premvarma Julitag'
Tralande disvastiĝas : « La batalo
Ĉe Kortrejk' okazanta ! » La imag'
Pezigas ĉies koron pro l' fatalo.

Aŭskultas knab' — oreĵon sur la tero —
L'obtuzan bruon de l' batal'. Ĉe l' pord'
Grizul', malmola en animsufero,
En pens' enprofundiĝas pri la sort'.

Dum rigardadas blonda virgulin'
Al Sud', al la senfina vojo griza,
L'okul' senmova pro malvarma tim',
Kolomb' tremanta pro l'ungego niza.

* * *

Somerabunde ondas la grenkamp'
En de l' vespera sun' rebrila oro.
Ho kiel ruĝa l'horizont' !... La stamp'
De l'estontec' : ĉu sang' ? Ĉu venkofloro ?

Aŭskultu !... Ĉu susuro de la vent'
Mistere ekstremiĝas la folion ?
Skuiĝas arbustar'. Kun tima sent'
Spirege la popol' atendas ion...


Subite ekkirliĝas polva nub'.
El ĝi aperas sur ĉeval' bravulo,
Kun hirtaj haroj, sang' en la okulo,
Plenpolva kaj kun sang' sur frunt' kaj sub.

Eklevas brakon ekstarante li
En pieding', kaj per sovaĝa sono
El pulma fundo ekaŭdiĝas kri' :
« Liber' ! Liber' ! Flandruj' al la Leono ! »

Kaj for sur forta virĉeval' galope...
Kaj en vilag' kaj urbo sonas kant !
Kaj ploras je feliĉo multaj ope
Pro l' venk'. Libera estas Flandroland' ! (*)

Tradukis TYNEVERUM.

(*) La ĉiujare en Flandrujo rememorata t.n. « batalo de la oraj spronoj »
en kiu la flandroj venkis la armeon de la franca reĝo Philippe-le-Bel.



PARTOPRENANTOJ DE LA 6a KONGRESO

Sur la ŝtuparo de la Brusela borsoj: 181 flandroj; 161 eksterlandanoj el
7 diversaj nacioj.

La 6-a Kongreso de la Flandraj Esperantistoj

Kompleta Sukceso Internacia Karaktero

Ne imagu, karaj gelegantoj, ke ĉi-tiu artikolo enhavos defalan raporton de A. ĝis Z. pri nia 6a ! Nia redaktora « eco » ne estas tiel altkvalita por tia laboro kaj cetere ni ŝatas surpaperigi niajn impresojn, spertojn, travivaĵojn kaj... kritikojn tiel malbonorde kiel ili sin troviĝas en nia ankoraŭ laca kapo.

Por pruvi tion, ni komencas je la fino : La kongreso sukcesis ĉiurilate ! La 342 partoprenintoj, inter kiuj 112 nederlandanoj, 18 germanoj, 17 angloj, 6 francoj, 5 svisoj, 2 valonoj, 1 dano kaj 181 flandroj ; la impona kunsido en la salonego de la Brusela urbdomo ; la festeno kun bonege preparitaj mangaĵoj kaj tre bongustaj vinoj (kiuj estis anoncigitaj per bele presita menukarto) ; la kabaredvespero ; la balo, la teatraĵo kaj, jes, ankaŭ la ĉarmulinoj, donis al nia 6a la epiteton : La Neforgesebla !

Tamen, ni ne trograndigu la aferon ! La eksterordinare granda kvanto da eksterlandaj samideanoj havas tri kaŭzojn : 1) la kongresurbo nomiĝas Brussel ; 2) la mondekspozicion ; 3) la malaltan monkurzon.

Ni supozas, ke multaj kalkulis (ekzemple nederlandanoj tre bone povas kalkuli) jene : Mi pagas 10 frankojn por kongreskotizo ; mi ĝuos 35 % an rabaton je mia vojaĝo de la landlimo al Brussel kaj reen, kiu rabato valoras pli ol 10 frankojn ; krome mi ĉeestos Esp. kongreson, mi havos profiton, do...

Se nia kongreso estus okazinta en alia loko, tiam ĝi certe ne estus tiom multvizitita, kiom nun. Sed, ni devas konfesi sincere, ke dum la kunsido, festeno kaj baloj, niaj eksterlandaj geamikoj ne dizertis al la ekspozicio.

Sabaton vespere, enirante la akceptejon, ni unue renkontis S. ron Cortvriendt, la sekretarion de la L. K. K. Malgrandstature laŭ korpkonstruo, li tamen estas la giganto, la koloso, la fortika akso, ĉirkaŭ kiu la tuta kongreso kaj precipe ĝiaj antaŭpreparoj turniĝadis. La ovacio, kiun la kongresanaro dediĉis al li, dum la lunda lunĉo, estas dekoble meritita.

Ricevinte el ĉarma virina mano niajn kongresdokumentojn, ni iris al « Hof Van Tilmont », kie Sro v. d. Dooren, prezidanto de la L. K. K., per mallonga sed trafa parolado, bonvenigis la kongresanojn kaj malfermis la kongreson.

La Ligoprezidanto Sro. L. Calloens respondis. Sekvis la montrado de la filmoj de la antaŭaj kongresoj. Kvankam ne tre klare, multaj kongresanoj rekonis sin el la bildoj. Poste Sro R. de Kegel, Ĉe-metoda instruisto, komencis sian amuzan lecionon. Kaj jen nia unua (konstrua) kritiko : La antaŭa propagandparolado estis por kongresanoj (precipe la nederlandaj) ne nepre necesa. Sekvontan fojon S.ro de K. pli bone agus komencante : Bonan vesperon ! Mi estas S.ro Robert de Kegel, k. t. p. Bedaŭrinde ni ne povis resti, ĉar ni devis ĉeesti la estrarkunvenon, kie oni pritraktis la sintenadon rilate al U. E. A.

Por la unua fojo oni ne sukcesis difini la lokon de la sekvonta kongreso. Ruselare ne akceptis pro manko de loĝadebleco kaj salonegoj ; Leuven pro la organiza laborego ; Oudenaerde ekzamenos la eblecon kaj ankaŭ ni aŭdis la nomon Dixmuide. Ni ne timu ke fine ne estos trovata taŭgan lokon, indan por nia 7a !

Reveninte en la salonego ni konstatis : La kongreso sin amuzas, la kongreso dancas. Regis internacia atmosfero.

La dimanĉa mateno trovis la kredemulojn en la preĝejo, kie nia fidela pastro De Coene, same kiel dum antaŭaj kongresoj oficiis la meson, kaj predikis Esperanflingve.

Sekrete li rakontis al ni, ke la kongresoj en Brugge, Arras kaj Brussel, ĉiuj lin invitis, sed, ĉar Brussel estis la unua invitinto, li elektis Brussel. Sed ni kredas ke la simpatia pastro iomete mensogetis ! Ni volas veti, eĉ se estus Brussel la lasta invitinto, ke nia pastro tamen estus akceptinta, ĉar ... kongreso de flandraj esperantistoj sen pastro De Coene estas simple ne imagebla ! Aŭ, ĉu vi ne mensogetis, via pastra moŝto ? *Nu, en la nomo de la L. K. K. de nia 7a ni invitas vin jam nun !* Ni ŝparos tiamaniere al vi konscienciproĉojn !

Post la meso formiĝis longa sekvantaro, kiu promenis al la borso por esti fotografata. Antaŭe la standardoj de la diversaj grupoj ; en la mezo de la sekvantaro granda streĉtuko kun nigraj literoj : **ESPERANTO-LINGVO INTERNACIA**. Multaj policanoj kondukis ĝin por haltigi la tutan trafikon sur la bulvaroj kiam ĝi preterpasas.

La fotografisto rapide faris sian devon kaj la foto sufiĉe bone aspektas. Kaj nun al la belega urbdomo, kie skabeno Coelst nin akceptas, nome de la urbestro.

Ni ne volas lacigi la gelegantojn per la redono de la paroladoj de S.roj v. d. Dooren kaj Calloens kaj la respondo de la skabeno, eĉ ne fragmente, cetere por tio mankas loko.

Sufiĉas sciigi ke la parolado de S.ro L. Calloens estis majstra propagando por nia lingvo, kaj la respondo de la skabeno elkora. La gvidis la kongresanaron tra la belegaj salonegoj. Bedaŭrinde ni persone ni ĝuis multe de tio, ĉar niaj redaktoraj oreloj aŭskultis interesan klarigadon pri la skismo en la nederlanda esperantistaro, el la buŝo de samideano Smit el Rotterdam.

En la teretaĝa salonego komenciĝis la ĉefa afero de la programo : la ĝenerala kunsido. Por la unua fojo ni troviĝis malantaŭ la verda tablo prenante notojn por kopio. Sed, ho ve, multe ni rigardis, multe ni aŭdis, sed ne multe notis ! Feliĉe S.ro Calloens sendis al ni sian paroladon skribitan. Por represi ĝin, ĝi estas tro longa, tial ni nun ĉerpas el ĝi por nia raporto.

Plezure li jam por la tria fojo prezidas la kongreson. Unue li rememorigis niajn amatajn mortintojn de la lasta jaro : S.ro Marcel Troch el Oostende, kaj Juul Karnas el Antwerpen, la redaktoro de Flandra Esperantisto. Li laŭdis D.ron Zamenhof, la idealiston. Li parolis pri flandroj, valonoj, belgoj kaj esperantistoj rilate la lingvan problemon en Belgujo kaj postulis ke la Flandra Ligo estu akceptata en la internacia movado, nome en U. E. A., senpere kiel memstara landa asocio. Li miregigis la flandrajn gesamideanojn anoncanta ke li ekŝiĝos kiel prezidanto se F. L. E. ne daŭrigas klo-

podu esti rekonata de U. E. A. Sekvis varma pledado por nia revuo, kiu estas nemankipova por nia movado kaj la preparo de niaj kongresoj. Li klarigis speciale por niaj eksterlandaj gastoj kial ni kongresis en Brussel, malgraŭ la sintenado, de la urbestro alprenita kontraŭ la flandra movado kaj petis al la nederlandaj kaj flandraj gekongresanoj en Brussel uzi nur la nederlandan lingvon por iliaj rilatoj kun Bruselanoj.

Sekvis la raporto de la Ligsekretario, S.ro Debrouwere kaj la raporto de la kasisto, S.ro Bassleer, el kiu ni sciigis, ke la stato de la kaso estas momente kontentiga (tio signifas : ne estas defcito, sed ankaŭ ne profito).

Post abonantoj-varba paroladeto niaflanke komenciĝis la salutparoladetoj. Salutis S.roj J. Telling kaj Smit por Nederlando; S.ro D.ro Ing. o Ellerbeck, Lingva Komitato, por Germanujo, S.ro De Waele por Francujo, S.ro Wadham por Britujo. Poste sviso, dano kaj valonino por siaj respektivaj landoj. (Bedaŭrinde, la nomoj de tiuj gesinjoroj ne atingis nin). Sekvis la gereprezentantoj de la multaj grupoj aliĝintaj al FL. L. Esp. kiuj laŭtradicie salutis, ĉiuj per neriproĉinda Esperanto.

Kelkaj ĉarmulinoj kolektis por subteni nian revuon kaj ravis S.ron Bassleer, la kasiston, per sumo de 251 fr.

Kaj nun al la « Brasserie Flamande », kie bongustaj manĝaĵoj kaj vino atendis nin. La bankedo estis festo tiel por la okuloj, kiel por la oreloj kaj la ... stomakoj !

La manĝaĵoj estis tiel bonaj kiel en Oostende pasintjare ; mankis nur la fiŝo, sed ni konsolis nin per duobla porcio da bongusta kokino rostita.

Intertempe oni kantis la kantojn el la bela kongreskantaro, je la sonoj de fortopiano. S.ro Calloens laŭtlegis salutleterojn : de la Internacia Geoh Instituto ; de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto ; de la Rejnlanda Vestfalia Esperanto Ligo (Revelo) ; de Germana Esperanto Asocio; de la Pollanda Esperanto Delegitaro; de la Itala Esperanto Federacio. Venis telegramo de F.ino Simonis, la ununura nederlandano, kiu ĉeestis la kongreson de Oostende pasintjare kaj nun partoprenas la kongreson en Arras.

Ĝis nun ni nemulte rimarkis ke la kongreso ankaŭ povas fieri pri honora prezidanto, nome S.ro Karel Verstraete, prezidanto de la Unuiĝo de la Okcident-Flandroj. Tre (aŭ tro?) honeste li sin retiris ĝis la komenco de la aro da toasty. En flandra lingvo li konfesis ke antaŭ multaj jaroj li lernis Esperanton, sed du faktoj haltigis la lernadon : 1e- la kunfuzo, kiun tiutempe kaŭzis la propagando por Ido kaj 2e- la amo ! Sed li estas feliĉa povi trinki je la sukceso de la 6a kongreso de flandraj Esperantistoj. Lian paroladon tradukis S.ro Calloens. Nun ĉie en la salonego aŭdiĝis toastparoladetoj. S.ro Telling, kiu kiel karavanestro kondukis ne malpli ol 49 ĉarmulinojn (krom la ĉarmulojn) trinkis, prave, je la sano de la ina kongresparto. F.ino Joukes (Rekta Vojo — Antwerpen) respondis, multe trinkante la sanon de la vira kongresparto.

S.ro Calloens trinkis je la nederlandanoj, kiuj respondis trinkante la sanon de la germanoj, la germanoj por la svisoj, tiuj ĉi por la francoj k.t.p. k.t.p. !

Botelo kaj glaso niaj ne enhavis plu unu guton, kiam estis nia vico. Sed nia fidela edzino vidis nian embarason kaj sorĉis plenan botelon da ruĝa vino antaŭ ni. Kaj ni povis trinki je la sano de la edzinoj de ĉiuj estraranoj, L. K. Kanoj kaj Redaktoro, ĉar tiuj edzinoj tiom ofte devas silenti, kiam la edzo devas laboregi por la bona afero !

Ĉio finiĝos, ankaŭ kongresbankedo; kaj ignorante la ceterajn programnumerojn ni iris ripozi por kolekti novajn fortojn por la vespero. Je la 20a horo ni revenis kaj trovis nur malmultajn gesamideanojn, kvankam la Esp. festo devus komenciĝi. Unu horon tro malfrue ĝi malfermiĝis per « La Espero ». Dum la kantado de nia himno tri karaj infanoj, per helpo de verda rubando, formis grandan stelon, kio plialtigis la solenan impreson. Sinsekve ni aŭdis nian kapablan kaj honestan samideanon Hektor Vermuyten, kiu deklamis « La Skribisteto » kaj « La Leciono al la Najfingalo » ; S.roj R. de Veirman kaj Leo Hens, kiuj ankaŭ bone kantis kaj deklamis. Plie la diplomdisdonado al la laŭreatoj de la ekzamenoj de Fl. Esp. Instituto. Fine la teatraĵo : « La Somero de la Sankta Martino », el la franca lingvo tradukita de nia karmemora Juul Karnas.

S.ro C. Schroyers jam dum monatoj preparis la geaktorojn al ilia malfacila tasko kaj li sukcesis bonege ! F.inoj Joukes kaj Van der Mast; S.roj Van den Eynde kaj de Gruyter, ĉiuj ludis perfekte sian rolon. Ni ne scias kiu estas plej admirinda, S.ro Van den Eynde pro sia natura ludado, S.ro de Gruyter pro sia kvieteco, F.ino Joukes pro sia patrina zorgo por sia mastro kaj nevino aŭ F.ino Van der Mast pro la belegaj manovroj de siaj ĉarmaj okuloj ! Kritiko ? Jes ankaŭ kritiko, per kiu la L. K. K. de la sekvonta kongreso povas fari profiton. La teatraĵo daŭris unu horon kaj estas por unuakta teatraĵo tro longa. Preferinde estas komedieto aŭ burleskaĵo, daŭranta ne pli longe ol 45 minutojn.

En ĉiuj programoj de teatroj, operoj kaj kineoj, oni trovas mallongan resumon de la enhavo. Kial ankaŭ ne en la programo de Esp. teatraĵo ? Ĝi estas same necesa en Esp. kaj flandra lingvo. Ne forgesu ke ĉiam dum kongresoj inter ni troviĝas freŝbakitaj Esperantistoj, al kiuj estas tre malfacile seninterrompe sekvi kaj tuj kompreni ludaĵon tute nekonata.

La fortepiano sur la scenejo malebligis al granda parto de la maldekstre sidanta aŭdantaro vidi la aktoron, kiu ludis la ĉefrolon. Kaj por fini nian kritikon, la estonta L. K. K. zorgu ke la senpaciencaj dancemuloj, kiuj troviĝas ekster la salonego, restu silentaj kaj ne ĝenu geaktorojn kaj aŭdantaron. Por fini la tagon, la kongreso dancis ĝis la dua horo matene. Estis vere internacia balo !

La dua Pentekosta tago ni lunĉis jam je la 11a en la akceptejo « Breughel ». Por ni kaj multaj aliaj la lunĉo estis ankaŭ la matenmanĉo. Dum la lunĉo aŭdiĝis multaj dankvortoj kaj adiaŭaj paroladoj. Kaj je la 13a horo la kongreso dividiĝis en du grandaj partoj. Unu parto iris per 4 specialaj tramvagonoj al la ekspozicio kaj alia parto al Tervueren. Enirinte la ekspozicion tuj la kongresanoj perdiĝis en la granda homamaso kaj de nun ni povis diri : la kongreso finiĝis. Kun kvar ĉarmulinoj, el kiuj du el Oostende, unu el Apeldoorn (Nederlando) kaj unu el Antwerpen (nia edzino) ni vaga-

dis tra la ekspozicio. Fine ni restis sola kun nia edzino. Estis preskaŭ noktmezo kiam ni eliris el « Ober Bayern », lacegaj sed kontentaj.

La ĉefa okazintaĵo de nia kongreso? Ni konservis ĝin por la fino de nia raporto. Ĝi estas la propono de S.ro J. Telling el Rotterdam por aliĝi al la Tutnederlanda Esperanto Ligo. *Tiu ĉi propono malfermas por la flandraj Esperantistoj aspektojn, eblecojn, kiuj nun ankoraŭ ne estas transvideblaj.* Sed la Ligestraro sendube ekzakte pristudos la proponon kaj dum la sekvonta Ligkunveno ni sciiĝos detalojn. Ĝi povas kaŭzigi gravajn ŝanĝojn en nia flandra Esperantista movado kaj plifortigi nian pozicion rilate al U. E. A.

La tuta L. K. K. meritas la sinceran dankon de la kongresanaro pro ĝia longa, laciga, prepara laboro!

Karaj gelegantoj, ni finas nian raporton. Ĝi ne estas tutplena, ni scias! Sed ni estas ankoraŭ lacaj kaj ankoraŭ ĉiam jen bruas jen susuras en nia kapo: « Sub signo de... Sarie Marijs!... ».

A. LODEMA.

Al la Gekongresintoj !

La organiza komitato de la 6-a Flandra Kongreso kore dankas la gepartoprenintojn pro ilia multnombra ĉeesto. Ni tutspeciale dankas la eksterlandajn Esperantistojn, kiuj grandnombre venis de ĉiuj najbaraj landoj kaj donis al nia nacia kongreso veran internacian karakteron.

Ni ne dubas ke la kongrestagoj estas al ĉiuj rememorindaj kaj ni esperas ke niaj eksterlandaj geamikoj, kiuj nun malkovris la vojon kondukantan al niaj ĉiujaraj ĉefkunvenoj, same multnombre ĉeestos la venontajn Flandrajn Kongresojn.

Specialan dankon ni direktas al niaj Antverpenaj geamikoj, kiuj efike kunhelpis al sukcesigo de la dimanĉa festo.

La organiza komitato streĉis ĉiujn siajn fortojn por ke la kongresservoj orde funkciu por la bono de la multaj gastoj. Ĉar neniu serioza plendo estas aŭdita, ni konvinkigis ke nian celon: kontentigi ĉiujn, ni plene atingis. Se tamen kelkaj partoprenintoj havas etajn riproĉojn al ni, ili estu indulgaj kaj atentu la fakton ke antaŭvidi ĉion detale por pli ol 340 personoj ne estas facila laboro.

LA ORGANIZA KOMITATO.



**Senprokraste renovigu
vian abonon ! Varbu abonantojn kaj anoncantojn !**

Rezultatoj — Ekzamenoj

Depost la kongreso en Oostende akiris diplomojn en :
Brussel. — 26-8-1934 kun *plej granda distingo* ; supera kapableco : S.ro De Brouwer Jozef el Lede.

SUPERA KAPABLECO

Aerschot. — 31-3-1935 kun *plej granda distingo* S.ro Winckel Jozef el Aerschot.

Kun *distingo* S.ro Van Passel Lode el Betecom.

Aalst. — 14-4-1935. F.ino Rombaut Gabrielle el Lede kun *distingo*.

SUPERA KAPABLECO

Brugge. — 28-4-1935 kun *plej granda distingo* : S.ro Roose Ferdinand el Brugge.

Kun *granda distingo* : S.ro Hermans Roger el St. Andries bij-Brugge ; S.ro Bruggeman Leo el Brugge ; S.ro Meersseman Roger el Brugge.

Kun *distingo* : S.ro Deprez Andre el St. Andries bij-Brugge.

Kun *kontentigo* : F.ino Meertens Irma el St. Andries bij-Brugge ; S.ro De Vriendt Johano el Brugge.

SUPERA KAPABLECO

Leuven. — 5-5-1935 kun *plej granda distingo* : S.ro Franken Fr. el Leuven.

Kun *granda distingo* : S.ro Albregts A. el Mechelen ; S.ro Cuypers Henri el Leuven ; S.ino De Kesel M. el Leuven.

Kun *distingo* : S.ro De Winter Pol el Mechelen.

SIMPLA KAPABLECO

Aarschot. — 31-3-1935 kun *plej granda distingo* : S.ro Van Passel Willem el Betecom.

Kun *granda distingo* : S.ro Patteet Frans el Aarschot.

Kun *distingo* : F.ino Tuymans Maria el Aarschot ; F.ino Verbiest Maria el Rillaer ; F.ino Mercke Maria el Aarschot.

SIMPLA KAPABLECO

Aalst. — 14-4-1935, kun *plej granda distingo* : F.ino Vereecken Laura el Aalst ; S.ro Cabbaut Eduard el Lede.

Kun *granda distingo* : F.ino De Mil Maria el Erondegem ; F.ino De Winter A. el Wetteren.

SIMPLA KAPABLECO

Leuven. — 5-5-1935, kun *granda distingo* : S.ro Balthazar Gust el Leuven ; F.ino Steylaers G. el Heverlee (Leuven) ; F.ino Voet E. el Mechelen ; S.ro De Rijbel Adiel el Mechelen.

Kun *distingo* : S.ro Mertens Frans el Aarschot.

Kun *kontentigo* : F.ino Balthazar Gaby el Leuven ; F.ino Van Cant Eulalie el Leuven.

La juĝantaro estas kontenta pri la rezultato kaj gratulas ĉiujn. Esperu ni ke ili pligrandigos la aron de niaj pacaj batalantoj.

La Sepa Jarkolekto

Sep estis kaj ankoraŭ estas nombro, kiu altiras la atenton...

Nia sepa jarkolekto nin atentigas pro la fakto, ke nia revuo ja atingas jam sufiĉe altan aĝon... Kaj! kaj! mi opinias ke ĝi povis esti jam pli forta, pli floranta.

Ĉu mi estas pesimisto? Tute ne, mi nur pripensas la fakton, ke dum la jara kongreso ni ĉiam denove aŭdas raporton, kiu almontras ke la nombro da legantoj ne sufiĉe pligrandigis. Tamen, niaj grupoj fervore, kuraĝe funkcias; multaj kursoj estas organizataj, kaj malgraŭ tio, proporcie la legantaro ne kontentige kreskas.

Kiuj estas la kaŭzoj?

La ĉefa, laŭ mi, devenas de la fakto ke la fino de la kursoj, ordinare ne koincidas kun la komencigo de nova jarkolekto. Pliaj ekslernantoj tiam ne restas en kontakto kun la kursgvidanto, ĉar ili ne ĉeestas la grupkunvenojn, aŭ ĉar en ilia vilaĝo ne ekzistas grupon, kaj tiamaniere ili ne abonas la organon. Sed nepre necesas ke ni gajnas la novajn adeptojn kiel abonantojn. Ni ja ne forgesu ke nia movado en Flandrujo estas bazita sur la Ligo, kaj la precipa ligilo inter la ligoj estas « Flandra Esperantisto ». Laŭdirde estas certe abonigi la gelernantojn jam dum la kursodaŭro, se tio estas ebla.

La kursgvidantoj almenaŭ povas jam multe fari por interesigi la gelernantojn pri la revuo. Ekzemple: ili uzu tekston el la revuo kiel diktaĵo, ili prelegu (je la fino de la kurso), artikolojn pri la venonta kongreso, k.t.p. ili klarigu ke oni iĝas Esperantisto ne nur sekvante kurson. Esperanto ja estas facile lernebla, sed tamen ne sen peno, sen kuraĝo. La plej bona, plej amuza intera ekzerco estas la legado de la revuo, de l' momento ke ili jam komprenas. Ili tiam notu la nekonatajn vortojn, prenu vortaron kaj post kelkaj monatoj la legado iĝos ludo.

Alia kaŭzo estas, ke ĝenerale la membroj ne sufiĉe sin interesas pri la organo.

La enketo dum la vintro nur kolektis malmultajn respondojn. Mi opinias ke la vera kialo de tio estas la manko de intereso. Eble multaj eĉ nenion legis pri la enketo. La vero estas la vero. La revuo estas por diversaj membroj nur speco de matenvekilo, kiu memoras ilin ke ili ja ĉiam estas membro de la flandra verdstelfamilio, sed tio ankaŭ ŝajnas sufiĉe al ili; ili ordigas la numeron kun la aliaj, eble trarigardas ĝin, eble legas la rubrikon « Inter Ni » koncerne ilia loka grupo, kaj jen la rolo de la revuo... (1)

Se la revuo ne plaĉas, skribu ĝin al la redakcio, sed interesas vi pri ĝi, legu ĝin, preparolu artikolojn k.t.p. prelegu la plej interesajn partojn dum la grupkunvenoj. Se ni povus magie ŝanĝi F. E. en gaja opereto de Stoltz kaj verki artikolojn ĉarmajn kiel valso de Strauss, ni certe obtenus gigantan sukceson!

(1) Por prui ke P.V. eraras, sendu tuj poŝtkarton al la Redakcio, ke vi legis lian artikolon! (Red.).

Nu, ni ankaŭ ridu, amuziĝu, kantu...

Sed ni ne forgesu la grandan taskon, kiun en Flandrujo ni prenis sur ni. Nuntempe oni multe klaĉas pri ordo kaj disciplino. Nu, ankaŭ discipliniĝu nia propra, tro facila, sed tiel senfrukta vivmaniero!

Estu ni fieraj, agemaj Flandroj, ĉar ankaŭ la flandra kultur-batalo jam ne finiĝis. Kunbatalu ni kune kun la nova ideo de Brusel. Brussel estas la vivo aŭ la morto de Flandrujo. Ni volas vivi...

Sed ni ankaŭ volas pacon inter la popolo. Tial ni lernis Esperanton. Se flanke la gepatra, Esperanto trapenetras en la vivon de la popoloj, ĉiuj kulturoj estos pli bone asekurataj kontraŭ ŝovinismaj klopodoj. La venko de Esperanto do protektos nian propran kulturon.

Ni harde batalu por tiuj ideoj, eĉ se ili ŝajnas fanatikaj. Ni estu fanatikaj en la plej nobla senco.

Ni celas flandran Flandrujon.

Ni volas esperantan mondon.

Nur tiam regos la vera paco...

« Flandra Esperantisto » al ni montru la vojon!

Kun amo, kun disciplino, kun memkonscio antaŭen en la separo de nia revu-ekzistado.

Pol VARENS.

Homo inter homoj

el la romano « La Silenta Rido » de Nico Van Suchtelen.

Se vi volas reorganizi kaj plibonigi la socion — kaj tion vi ĉiuj volas en via koro, ĉar kial alie vi riskus plendi pri ĝi — tiam unue vi devas fidi vin mem. Vin mem kaj unu la alian. Kaj la grandan Majstron, kiu gvidas nian absurdecon al la bono. Kaj same kiel Li scias kion Li volas, tiel ankaŭ vi devas bone scii kion vi volas. Tio signifas ne kion emas via blinda pasio kaj deziro, aŭ pri kio ili kiel infanoj plorpetas aŭ kriadas, sed kion via koro, kiam ĝi estas tiel kvietaj kaj trankvilaj ke ĝi povas aŭskulti kion diras la logiko, postulas, ne de io aŭ de iu alia, sed de vi mem. En tia momento vi komprenas ke vi nenion alian volas aŭ preferas ol : vivi kiel homo inter homoj. En multaj religioj kaj filozofioj vi serĉis respondon je viaj vivdemandoj kaj direkton por via vivmaniero. Se ili ne kontentigas vin, nu, tiam kvietanime flankenĵetu ĉiujn tiujn religiojn kaj filozofiojn kaj donu mem kiel unua propra respondo tiun ĉi : « Mi volas vivi kiel homo inter homoj ». Ne pensu ke tio estas nova « doktrino » sur kiu vi devas konstrui novan « sistemon » de praktika moralo. Ne necesas novaj eklezioj aŭ sektoj, nek koncilioj aŭ sinodoj, nor konstati la veran enhavon de tiu ĉi evangelio. Vi eĉ ne bezonas fondi asocion, ligan aŭ partion, kun sekcioj, statutoj, raportoj, pli-grandigantaj kotizoj, jarkunveno kaj kongresoj. Jes, mi eĉ timus ke ĉe tiom da entuziasmo la nova evangelio laŭirus la saman vojon kiel ĉiuj malnovaj. Estas vere plej bone TIEL ĝin rememori. Tri vortoj, el kiuj ja du estas la samaj : Homo inter Homoj ! Ne, ne petu ruze : kio estas homo ? Ĉar vi kaj ĉiu alia precize scias kion signifas : vivi kiel homo inter homoj. Konduti sin mem kiel homo,

kaj do — la aliflanko de tio — trakti aliajn kiel homo. Via klera intelekto diras al vi ke tiu ĉi « principo » estas la memkomprenebla, fundamenta moralo en socio de... homoj. Kaj via konscienco ĝin tuj kaj nedubesenca diras al vi kiam vi pekas kontraŭ tiu moralo; plejofte eĉ nepetate. Sed krom tio alkiutimigu vin nepre ĝin demandi. Ekzemple, kiam vi batis vian infanon aŭ mokis pri ĝi; kiam vi incitis subalternulon, kiam vi klaĉis pri via najbaro aŭ kiam vi anoncis ke nur VI vendas bonan dentopurigan paston. Kaj se tiam vi devas konfesi al vi ke vi pritaktis vian infanon, vian subalternulon, vian najbaron kaj viajn klientojn, kiel duon-idiotojn, al kiuj vi povas ĉion kredigi, aŭ kiel iaajn saĝajn bestojn, kun kiuj vi laŭplaĉe povas agi, tiam subite vi rememoros klare ke via propra konduto ne estas hominda kaj ke TIAL viaj infanoj timis vin, viaj subalternuloj malamas vin kaj viaj samcivitanoj ridas pri vi ! Tiam hontu pri vi mem kaj iĝu pli saĝa. Tio signifas, hontu pri vi, sed ne TIAL profunde ke perdiĝus via deziro sekvont-okaze fari al vi la saman demandon : ĉu tio estis inda je homo ? Kaj lernu tion al viaj infanoj antaŭ ĉio kaj super ĉio. Tio estas multe pli interesa ol franca lingvo, algebro kaj nacia historio. Lernu al ili kio estas « honoro ». Ne — vi tiel facile intermiksas samnomajn aferojn — ne la preskaŭ ne plu ridinda arroganteco aŭ tromemfido por kiu maldecetaj studentoj kaj ventanimaj oficiroj kutimas dueli; ankaŭ ne la krude-kaŝita egoismo kaj perfideco per kiuj ŝtatoj sabrotinte defendas siajn « interesojn ». Ankaŭ ne la malŝatinda sklavemeco per kiu viaj « herooj » obeas la plej malmoralajn ordonojn de siaj superuloj. Sed la HONORO, la efika memrespekto, kiun sentas homo, kies ago estis inda je la homaro.

Estas afero simple pedagogia. Vi malŝatas kio estas facila kaj saĝa. Tamen estas vere, sufiĉas unu generacio de infanoj, konscie edukitaj kiel homoj anstataŭ kiel komercistoj, oficiroj, advokataj, k.t.p. kaj ĉiuj viaj imponaj sociaj problemoj estus solvitaj. O, nur unu generacio de homoj, kiuj VOLAS firme kaj sincere ! Sed tiu ĉi generacio ne venos se vi ne korprofunde devigas vin mem, ne al senfruktodona pentofaro kaj memhumiligo, sed al tiuj grandaj kaj vivaj fido kaj memkonscio, kiuj sole povas ŝanĝi la socion, rompi la malbenon de la mortaj cirkonstancoj.

Miaj amikoj, antaŭ ĉio mi volis paroli al via koro. Ekzistas sufiĉe, eĉ tro multe da personoj, kiuj parolas al via... ne, ne al via intelekto, sed al via idioteco. Iatempe mi imagis al mi pli ami insektojn ol homojn. Ĉi-tie, sur tiu-ĉi batalkampo, kie mi vidas ke homoj mortigas unuj la aliajn, eĉ pli kruele ol formikoj aŭ lokustoj, mi sentas alie. Eble ĉar tie-ĉi, flanke de sovaĝuloj kaj diabloj, mi vidas tiom da HOMOJ estajoj kiuj iam grandparte estis infanaj malfortuloj, tamen kiuj iĝis homoj per malsato, mizero kaj terurego. O, ekzistas homoj... ankaŭ inter la barbaroj. Se ie, tiam tie-ĉi mi lernis ke homoj ankaŭ povas esti kamaradoj, kaj ke nenio estas pli bela ol la fido de homo al homo, kio fine estas nenio alia ol fido en la vivo, la nura en ni, kiu estas eterna kaj vera.

Je la nomo de tiu eterna kaj vera en vi : returnu en vian koron, akceptu la lecionon kiu povas ankoraŭ pravigi kaj sanktigi tiun-ĉi

militon ; forjuru egoismon kaj tromemfidon kiuj kaŭzis ĝin; lernu vivi kiel homo inter homoj. Tiam vi ja iam povos beni la suferojn, kiuj estis necesaj por konduki vin ĝis tiu simpla koncepto, kaj vi povos rememori la mortintojn melankolie, ne akrigite per vengemo kaj konsciencoriproĉo, sed mildigite kaj purigite per rezignacio kaj dankemo.

Kun afabla permeso de la aŭtoro

Tradukis : Pol VARENS.

Wij lezen in « De Standaard » van 4n Juni een verslag over de vergadering der P.E.N. Club te Barcelona, waarin o.a. voorkomt : *Een Vlaamsch Voorstel.*

Naar aanleiding hiervan schreef onze Voorziter als volgt :

Den Weled. Heer F. V. TOUSSAINT VAN BOESELAERE,
Generaal Jacques-laan, 109

BRUSSEL.

Hooggeachte Heer,

Dit is nu reeds de tweede maal dat ik in een verslag over de P.E.N. Club lees dat het talenvraagstuk of liever de talenverwarring U moeilijkheden berokkent.

U houdt werkelijk van de P.E.N. Club en betreurt die moeilijkheden ? Laat mij toe eraan te twijfelen, vermits de oplossing voor het grijpen ligt, gereed praktisch, volledig.

Mag ik U mondeling bewijzen dat Esperanto bekwaam is U te helpen om een internationaal tijdschrift — hoe wetenschappelijk ook — uit te geven ? Komt U kijken naar ons Vlaamsch Esperanto-Congres te Brussel, waar Vlamingen, Walen, Engelschen, Duitschers, Italianen, Zwitsers, Nederlanders elkaar zonder de minste moeite verstaan.

Ik noodig U zelfs uit op ons banket, Zondag te 13 u. 30 in « Brasserie Flamande » : een woordje van U is voldoende en ik doe het noodige om U aan onze eertafel een plaats in te ruimen : daar komen de tongen los.

Ook op de officieele vergadering van Sinksen, te 11 u. 30 in een salon van het Brusselsche Stadhuis, wordt de groet gebracht van alle vreemde en inlandsche groepen. Gedurende de drie dragen van het congres wordt er geen Nederlandsch gesproken, enkel Esperanto.

Hierhij documentatie. Steeds genegen om verdere inlichtingen te verschaffen.

Hoogachtend.

L. CALLOENS,

Voorzitter der Vlaamsche Esperantisten,

Voorzitter van het Vlaamsch Verb. der Katholieke Esperantisten (1)

(1) La L. K. K. povis ŝpari la prezon de unu tagmanĝo! (Red.).

Gravaj komunikoj

La Redaktoro libertempos de la 12a. de julio ĝis la 30a. Por urĝaj aferoj, rilatantaj la aŭgustan numeron lia adreso estos : «Grand Hôtel d'Oostduinkerke » — Oostduinkerke-Bad —. Kunlaborantoj bonvolu ensendi kopion antaŭ la 11a. de julio, se eble !

S.ro N. De Haaff, dum du jaroj la ekspedisto de nia revuo, transdonis sian taskon al S.ro H. Van der Mast, Tweelingstraat, No 6, Antwerpen. Adresŝanĝojn, demandojn pri ne-ricevitaj aŭ malnovaj numeroj, oni sendu de nun al S.ro H. Van der Mast.

Ni dankas S.ron N. De Haaff pro lia dufara helpo.

REDAKCIO.

Oficialaj fotografajoj de la kongreso ankoraŭ estas haveblaj. Viajn mendojn direktu al : oficejo de la 6a. Flandra Kongreso de Esperanto, 3, Pieter van Humbeekstraat, Brussel (W.).

Poŝtkartformato	Fr. 1,75
Formato 13 × 18	6,—
Formato 18 × 24	10,—

Afrankita sendo ! Liverado nur post antaŭpago !

Ĉiuj pagoj pere de ĝirokonto : 4136.04 de Em. Cortvriendt.

Esperanto malpermesita en Germanujo !

La germana ministro de instruado RUST malpermesis Esperanton en la lernejoj. Por la germanoj taŭgas nur unu lingvo, la germana. Esperanto estas lingvo por la judaro kaj Marksistoj.

Ĉu tio malpermeso estos malprofito, aŭ efika propagando por nia lingvo ?

Ni supozas ke la cerboj de Ministro Rust konsistas el Rustaĵo !

Ni atendu, kiel niaj grandaj ĵurnaloj, Esperanto kaj Heroldo, reagos je tiu-ĉi afero, ĉar tutmonda protesto devas lerni al la germanaj aŭtoritatoj, ke Esperanto estas vivanta lingvo !

Ŝipekskurso Antwerpen-Vlissingen-Antwerpen

Tikedoj estas ankoraŭ haveblaj por la ŝipekskurso de la 7a de julio. Prezo : Fr. 17,50. Infanoj, malpli ol 10 jaraĵ, pagos la duonan prezon.

A. LODEMA,

Houwerstraat, 22, Antwerpen.

Bibliografio

(Duope ricevatajn verkojn ni recenzas, unuope ricevatajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

LA JUNA VIVO 1934-1935.

La Redakcio de tiu-ĉi dusemajna organo por la junularo de 12 ĝis 16 jaroj kaj por komencantoj sendis al ni la unuan jarkolekton. 196paĝa, ĝi estas bele presita sur bona papero kaj bindita en kartono. La enhavo estas varia kaj tre leginda, ne sole por la junularo sed ankaŭ por pli aĝaj.

La teksto estas pliklarigita per belaj portretoj, gravuroj, desegnaĵoj, k.t.p. La kunlaborantoj konsistas, preskaŭ senekcepte el geinstruistoj. Prijuĝante ĝin, ni plezure ripetas, kion S.ro H. Rainson skribis en Flandra Esperantisto No 3 (Sept. 1934) :

« La Revuo ne nur estas interesa por infanoj, sed ankaŭ por » novaj esperantistoj. Ĉi estas tre utila, ĉar la lingvaĵo estas simpla; » kiel eble plej malmulte da partecipoj kaj mallongaj frazoj. Tial mi » konsilas al ĉiu grupo, prenu abonon por la grupo, ĝi certe helpos » perfektigi la novajn esperantistojn. La revuo estas ankaŭ utila kiel » manlibro en perfektiga kurso : tion ni intencas fari por la venonta » kurso. »

Le prezo estas nur 16 belgaj frankoj ! La bela libro estas mendbla ĉe la Redakcio : West-Graafdiijk (N. H.) Nederlando, Gironumero 209354 Nederlando. Ankaŭ pere de Flandra Esperanto Instituto.

A. LODEMA.

De la Esperanta Domo en Arnhem, Nederlando, ni ricevis prospekton enhavantan la okazontaĵojn ĉi-somerajn :

Internacia perfektiga kurso okazos 8-13 julio ;

Seminario por Cseh-metodaj instruistoj 15-20 julio;

Internacia kunveno de esperantistaj geinstruistoj 25-29 julio.

Vizitoj de britaj karavanoj okazos 3-11 kaj 17-25 aŭgusto.

Por informoj pri la loĝado oni sin turnu al Esperanto Domo, Esperantolaan, 3, Arnhem, Nederlando, telefono 26060.

Por partopreno al la kursoj oni informu ĉe : Internacia Cseh Instituto de Esperanto, Riouwstraat, 172, De Haag, Nederlando. (Telefono 556677, poŝtĉekkonto Den Haag 162626).

Grupa Vivo

ANTWERPEN. — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

La, por la kongreso, starigita ŝparkaso donis bonan rezulton. Ĝi ebligis al ni iri al Brussel kvardekope. Neniam ni forgesos la agrablajn kongrestagojn, kaj poste, ni ankoraŭ ofte murmuros : Estingu la kandelon, Marie !

Ne atendante la bonan veteron ni jam faris dum la lastaj semajnoj kelkajn ekskursojn. Al Santvliet, Turnhout, Brussel, k.t.p. Notindaj estas, dum la monato julio, la sipekskurso al Vlissingen kaj la ekskurso bicikle kaj aŭtobuse al Breda. Ĉi tiu lasta je invito de Nederlandaj samideanoj. La rapidkurso, majstre gvidata de S.ro C. Schroyers, baldaŭ finiĝos. Inter la gelernantoj, ni varbos novajn adeptojn por la ideo kaj espereble, novajn anojn por nia grupo.

La ĉiusemajnaj kunvenoj estas ĉeestataj kiel neniam antaŭe kaj ili estas bruaj, kiel decas.

Regas la entuziasmo. Flandrema antaŭen !

BRUSSEL. — N. E. L. E. — La subvencio de la Provincestraro havigis al ni la eblon pliriĉigi nian bibliotekon per multaj gravaj libroj, i. a. Tra la Labirinto de la gramatiko, Gosta Berling, Ĉirkaŭ la Mondon k.t.p.

La postkongresaj laboroj estas kaŭzo ke nia ĝenerala jarkunveno ne okazis je la laŭstatute fiksita dato. Ĉiu ano estos invitata al tiu grava kunveno per speciala cirkulero.

EDEGEM. — NIA IDEALO.

Post longa silento denove la grupo komunikas kelkajn interesajn novaĵojn. Merkredon, la 12 an de junio la loka grupo aranĝis specialan kunvenon en sia ejo, kie ni renkontis Sinjoron Bingham, anon de la Londona Esperanto Klubo el London. Nia invitito estis tiel afabla informi nin pri la movado en Anglujo, pri la propagandmanieroj kaj la laboro de sia grupo.

Niaj anoj atente sekvis la klarigojn de nia gasto, kaj eĉ li mem zorgis pro ega interesajo. Inter la ĉeestintoj estis ankaŭ du ne-esperantistoj kaj por montri al ili, ke la lingvo internacia ne estas tiom malfacila, li komencis mallongan instruadon laŭ la konata Csehmetodo. Mirindaj estis la rezultoj, ĉar jam post nur kelkaj minutoj la du fraŭlinoj interparolis kun nia amiko.

Tio ankoraŭfoje montras ke, kvankam estas tiom da personoj, kiuj tre malfavore juĝas pri Esperanto, ĝi ne plu estas la iamnomita utopio. Ĝi ja multe antaŭeniris kaj certe iam efektiviĝos, dank' al la ega kaj senlaca laboro de la esperantistoj.

Kaj nun geamikoj, ĉiam antaŭen !

RONSE. — LA PACA STELO.

La grupo de Ronse ne dormas, ĉar kun nova kuraĝo ili entreprenos la 7an jaron de la fondiĝo, nome tiun-ĉi monaton.

Dum la kongreso nia grupo estis bonege reprezentata, ĉar ne malpli ol dudeko da gemembroj ĉeestis la kongreson.

Jen la programo por la ununa monato de nia 7a jarekzistado
3an de julio : Kantvespero.

10 Deviga ĝenerala Kunveno (Gravaj komunikaĵoj).

17 Traduko de nia libro. « De Filisoof van Haagem ».

24 Distraja vespero.

RUSELARA GRUPO ESPERANTISTA.

La 2an de junio la biciklemaj gesamideanoj organizis ekskurson al Ardoye, kastelo kaj arbaro. La pluvminacinta vetero ŝanĝiĝis je la momento dezirata. Ni ĝuis agrablan posttagmezon en la verda kaj arboriĉa ludejo, tie praktikante esperantajn ludojn. Dum Pentekosto, okazis la granda renkonto en la kongreso. La favora situacio de la grupo permesis al ni enskribigi 17 gepartoprenantojn ; ĉiuj revenis ege ravitaj pri la agrableco kaj utileco de tia kongreso.

Ĉiulunde la membraro ĉeestas la grupkunvenon, kie oni okupas sin pri Esperanto, kaj pri la plej interesaj fakoj de la movado. En ĉiu kunveno certa parto restas rezervata por amuzo kaj kantado. Por la estontaj tagoj estas intencata bicikla renkonto kun la Oostenda grupo. kaj certe ankaŭ vespera vizito al la Lichtervelda grupo.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: Leo Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst.
Ondervoorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap (met maandblad): 20 fr. per jaar.

Aangesloten groepen:

Aalst: « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Grootte Markt; vergaderingen elke Woensdag avond.
Aarschot: « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 70, vergaderingen elken Woensdag avond.
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Oude Gentweg, 3.
Brussei: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquemainlaan, 37; vergaderingen elke Dinsdag avond.
Edegem: « Nia Idealo », Drie Eikenstraat, 665.
Hamme: « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.
Kortrijk: « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.
Lede: « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede.
Leuven: « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.
Lichtervelde: Sekretariaat, Weststraat, 47.
Mechelen: « La Estonto », lokaal: Bovenzaal der stedelijke Bibliotheek, Wollemarkt; vergadering elke Vrijdag te 20 uur. — Briefwisseling: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54.
Nieuwpoort: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Langestraat, 6.
Oostende: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.
Oudenaarde: « Al Paco »; sekretariaat: Nederstraat, 8.
Roeselare: « Ruselara Grupo Esperantista »; Statiedreef, 177.
St. Niklaas: « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

Alle inlichtingen verstrekken verder te:

Diksmuide: M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.
Gent: Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stacegemstraat.
Hoboken: J. de Groot Caronstraat, 31.
Maria-Hoorebeke: Gerard Broodcoorens, Dorp.
Meenen: K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.
Millen (Tongeren): L. Geukens, Langstraat.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.
Thielt: R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

ESPERANTISTOJ!!!

La

KANTARO ESPERANTISTA

Kompilita de Juul Karnas

enhavas 111 kantojn,
estas 112 paĝa,
enhavas ion por ĉies gusto,
enhavas la plej belajn perlojn el la
popolkantoj de ĉiuj nacioj,
estas bele eldonita,
kaj ... kostas nur 6 frankojn!

Mendu ĝin tuj ĉe
H. v. d. Mast. poŝtkonto : 209.852.
Tweelingstraat, 6, Antwerpen.

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj
malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

Abonu tuj la monatan gazeton

“ LA JUNA VIVO ”

Jen vi havas la plej malkaran gazeton por gejunuloj kaj komencantoj. Interesa enhavo, facile komprenebla lingvo; tre taŭga legaĵo por kursoj.

Jarabono : 15 fr.

Petu senpagan specimenon de :

Redakcio de « LA JUNA VIVO »

West-Graftdyk N. H.

Nederland.

« Presejo de l' Centro », Kipdorpest, 26, Antwerpen.